

LA MONDOFINO

artikolo publikigita en la revuo Nigrizia numero 5

Por multaj homoj estas nepridiskutebla afero ke venos la mondofino, ĉar tion deklaris plurfoje Jesuo; temas nur pri tio, ke oni eksci kiam ĝi okazos. Estas jam ekde la jaro Mil ke regule alvenas al ni certegaj antaŭdiroj pri tiu ĉi fino prokrastita, fojon post fojo pro reipenso de la Eternulo, aŭ pro la preĝoj, pro la pentofaroj kaj fastoj de Liaj plej bonaj gefiloj. Nuntempe oni fiksas la mondofinon por la 21a de decembro en 2012, escepte de prokrastoj aŭ reipensoj fare de la Sinjoro. Tion atestas Maja-aj kalendaroj, profetaĵoj, certaj kaj fidindaj vizioj. Naturaj katastrofoj kiel timigaj tertremoj kaj teruraj cunamoj estas nur etaj antaŭanoncoj pri tio, kio okazos per la proksimega mondofino.

Se tiel estas, utilas ke oni sin pretigu ĝustatempe al la okazintaĵo, por ke ĝi ne trovu la homojn nepreparitaj, kiel konsilis gravega viro kia estis Sankta Paŭlo, kiu, plene konvinkita pri la tuja mondofino, klopodis, neaŭskultita, atentigi la kristanajn komunumojn: "La tempo estas mallongigita, por ke de nun tiuj, kiuj havas edzinojn, estu kvazaŭ ili ne havus; kaj la plorantoj, kvazaŭ ne plorantaj; kaj la ĝojantoj, kvazaŭ ne ĝojantaj; kaj la aĉetantoj, kvazaŭ ne posedantaj; kaj tiuj, kiuj uzas la mondon, kvazaŭ ne trouzantaj ĝin; ĉar la formo de ĉi tiu mondo forpasas!" (1a Kor. 7, 29-31).

Jes, ja, Sankta Paŭlo estis pli ol certa pri tio: "la formo de ĉi tiu mondo forpasas!". Anstataŭe, havis la tempon forpasi Sankta Paŭlo mem, forpasis la ricevantoj de liaj avertoj, kaj forpasis ĉiuj kiuj, konvinkitaj aŭ ne konvinkitaj, anoncis, esperis aŭ timis la mondofinon.

Kiu ne forpasis estas Jesuo. Kaj Lia mesaĝo, la bona novaĵo konfirmiĝas pli valida kaj aktuala ol iam ajn. Ĝuste ĉar temas pri bona novaĵo, Lia mesaĝo estas tute adresita al la feliĉo de la homo, ĉar tia estas la volo de la Patro, ke ĉiuj estu feliĉaj tie, dum ĉi tiu surtera ekzisto. Kaj la bona novaĵo entenas ankaŭ la elementojn por plena feliĉo: ĝi konsistas el tio kion oni faras por la aliuloj, kaj tio estas ebla al ĉiuj (Pli feliĉe estas doni, ol ricevi!" Agoj 20,35).

La bona novaĵo de Jesuo ne entenas minacojn pri katastrofoj aŭ pri proksimega mondofino, sed ja ĝi entenas la malon. En neniu evangelipeco oni anoncas aŭ antaŭdiras mondofinon. Eĉ male!

Sankta Johano skribas en sia Evangelio ke "Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon,..." kaj ke "Dio sendis Sian Filon en la mondon, ne por juĝi la mondon, sed por ke la mondo per li estu

savita." (Joh. 3, 16-17), kaj estus vera strangaĵo se iu Dio kiu sendas sian solenaskitan Filon por savi la mondon, poste Li volus ĝin detrui.

Jesuo neniam anoncis la mondoĉion, sed li anoncis profundajn ŝanĝojn kiuj ĝin plibonigos kaj ĝin igos pli homa iom post iom. Tiuj ĉi ŝanĝoj estas la mondoĉio, epokoj, ĉieloj kiuj ŝajnis eternaj tiom ili estis enradikiĝintaj en la historio, kontraŭe ili ĉiuj dissolviĝis. Je avantaĝo de la homaro.

La Kreinto amas sian faritaĵon, la kreon.

Dio kreas, Li ne detruas.

La rakonto pri la kreo, rakontita en la Libro Genezo, ne estas la bedaŭrata perdita paradizo, sed ĝi estas la profetaĵo pri konstruenda paradizo. Kaj la homo estas vokita kunlabori kaj finkonstrui tiun kreaĵon ("Mia Patro ĝis nun laboras, kaj mi laboras", Joh. 5,17).

Kaj ĝuste en la Libro Genezo oni malkonfirmas ĉiujn katastrofajn antaŭvidojn rilate la mondoĉion. Pere de la rakonto pri la diluvo, fakte, la verkisto volas korekti la kredadon kiu rilatigis la atmosferajn fenomenojn al la dia kolero, kaj la Sinjoro mem certigas ke "ne ekstermiĝos plu ĉiu karno per akvo de diluvo, kaj ne estos plu diluvo, por pereigi la teron" (Gen. 9,12). Kiel pruvo de sia deklaro, la Sinjoro... formetas la armilojn: la pafarko, la ilo kiu utilis al Dio por ĵeti la fulmojn kaj puni la homojn, estas definitive formetita. La pafarko de la Sinjoro ne nur ne plu utilis por puni la homojn, sed ĝi fariĝos la signo de la interligo inter Dio kaj la homaro: "Mian arkon Mi metas en la nubon, kaj ĝi estu signo de la interligo inter Mi kaj la tero" (Gen. 9,13).

Ekde ĉiam la mesaĝo de la Sinjoro donas trankvilecon, ne ĝin forprenas.

Jesuo neniam anoncis iun ajn mondoĉion. Liaj lastaj vortoj, en la Evangelio laŭ Sankta Mateo estas: "Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturaĝo de la mondaĝo". (Mat. 28,20), temas pri dirmaniero per kiu Jesuo ne indikas limdaton, sed li indikas la intensecon de sia ĉeesto, "por ĉiam/ eterne", laŭ la signifo de la greka vorto αἰών tempo/ epoko, (dum mondo en la greka estas κόσμος).

Se, bedaŭrinde, kiel ofte okazas, en iu Evangelio oni tradukas tiun esprimon per "mondoĉio", temas nur pri tradukproblemo kaj ne pri vero je fido. En la nova traduko de la Itala Episkopa Konferenco (CEI) (2008), surprize reaperas tiu esprimo (kiu estis malaperinta en la meza eldono de 1997, kie oni tradukis ĝin: "ĝis kiam tiu ĉi tempo estos finita"), temas pri traduko kiu estas malkonfirmita de la piednoto en "La Biblio de Jerusalemo", en kiu oni klarigas: "Tio ne signifas la mondoĉion, la terofinon, sed, pli ĝuste, tio signifas la finon de la nuna epoko de la historio de la savo, de la Eklezia erao". Plej bona estis la latina traduko, kiu raportis "usque ad consummationem saeculi" (ĝis la fino de la jarcentoj).

Ekzistas neniu timinda mondoĉio, sed ekzistas dezirindaj finoj de historiaj epokoj.

Kiam Jesuo rivelacias ke "la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos" (Mt. 24,29), Li ne anoncas katastrofojn kiuj trafos la teron kaj ne estas citita iu ajn teruraĵo por la homoj. La suno kaj la luno estis konsiderataj kiel diaĵoj, kaj kiel tiaj ili estis honorataj de la paganaj popoloj (Read. 4,19), kaj per la vorto steloj oni indikis la potenculojn, kiuj ambiciis la dian kondiĉon kaj pro tio ili loĝis en la ĉielo ("Kial vi falis de la ĉielo, ho brilo, filo de la matenuro?" Jes. 14,12). La katastrofo minacas ne la mondon, sed la ĉielon kiu oni konsideris kiel loĝlokon de ĉiu potenculo.

Tiuj de Jesuo estas vortoj kiuj kaŭzas ne timegon sed esperon: "Kiam tio komencos okazi, rigardu supren kaj levu viajn kapojn, ĉar via elaceto alproksimiĝas." (Lk. 21,28).

La anonco de la Evangelio, "la bona novaĵo" de la vera Dio fare de la disĉiploj, vokitaj esti "lumo de la mondo" (Mt. 5,14) estigos malaperon de la malveraj diaĵoj kaj per tia afero la disfalon de la reĝimoj kiuj sin apogis sur ili kaj de la potenculojn kiuj regis la homojn.

Sekve de tio tiaj tekstoj ne rilatas al iu ajn mondfino, sed ili rilatas la definitivan finon de epokoj kiuj ŝajnis eternaj, ne ŝanĝeblaj. La historio daŭros, tamen la mondo estos ŝanĝinta sian aspekton.

Jesuo anoncas ke post la detruado de Jerusalemo kaj de ĝia Templo (kiu okazos en la jaro 70a p.K. fare de la Romianoj) komenciĝos nova epoko por la homaro. La disfalo kaj la malapero de juda religia institucio ne estas la fino sed la unua etapo el tiu neinvertigebla procedo en la historio kiu vidos la disfalon de ĉiuj tiuj povoj sin oponantaj al la realigo de la regno de Dio.

Ĉiu reĝimo baziĝanta sur la povo kaj sur la superregado de la homo jam enhavas en si mem la embrion de sia detruo kiel giganto kun argilaj piedoj (Readm. 2, 33).

La disfalo de reĝimo kiu ŝajnis eterna povas simili la mondfinon, sed ne temas pri la mondfino sed la fino de iu mondo. Sankta Aŭgusteno mem, en la jaro 429a, opiniis ke la mondfino estas proksima, vidinte kraki la romian imperion sub la insidoj de la barbaraj Vandaloj regatataj de Ĝenseriko, ĉar por li estis nepripensebla la mondo sen la romia imperio.

Tial neniu apokalipso estas timenda sed nur realigenda. La greka vorto kiun oni tradukas per *apokalipso* signifas nenion alian ol revelacion. Kaj kia estas tia revelacio? Ne temas pri timigantaj katastrofoj kiuj terurigas la homojn, sed temas pri la sciigo ke Dio estas ĉiam flanke de la subpremantoj kaj neniam Li estas flanke de la subpremitoj. Tia estas la revelacio kiu kuraĝigas kaj vigligas la kristanan komunumon kaj donas al ĝi la forton antaŭenirigi la mesaĝon de la bona novaĵo en kontraŭa medio pere de la certeco ke ĉiu subpremanta reĝimo vidos sian finon.

Alberto Maggi